

# LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro; Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung; Robert Kreuz, LK.; Ing-ro R. Orengo, LK. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo

VOL. I \* N-RO 12

MONATA ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

JANUARO 1933

Studejo de Zamenhofa Gramatiko, Tokio:

## Teksto-Kritiko de la Paroladoj de Zamenhof

laŭ Originala Verkaro de D-ro Dietterle.

### 403. Sepa Kongreso 1911 en Antwerpen.

OV ref: LI, Era, OG, R, ED.  
Niaj ref: LI, Era, OG, R, ED, Ĉek, Möb, Brüg.  
(Raporto de Era estas eltiraĵo el LI, kaj OG kaj ED estas identaj.)

403-16. en la nomo de ĉiuj kongresanoj. LI sola legas nomoj anstataŭ nomo. La ununombra formo estas kompreneble Zamenhofa. Komparu:

- 364-31. en la nomo de ĉiuj amikoj.
- 368-39. en la nomo de vi ĉiuj.
- 369-5. en la nomo de vi ĉiuj.
- 374-20. en la nomo de ĉiuj kongresanoj.
- 384-35. en la nomo de ĉiuj esperantistoj.
- 391-17. en la nomo de ni ĉiuj.
- 403-16. en la nomo de ĉiuj kongresanoj.
- 403-23. en la nomo de la kongresanoj.
- 404-23. en la nomo de la tuta esperantistaro.
- 454-25. en la nomo de la kongresanoj.
- 463-44. en la nomo de la esperantistoj.
- 572-27/8. en la nomo de mia edzino kaj de mi.

403-24. al la urbestro de Antverpeno. OV kaj LI legas urbestro, dum ĉiuj aliaj urbestraro. La urbestro Jan de Vos tre gastame akceptis Zam kaj eĉ faris salutparolon al la Kongreso. Ŝajnas tamen ke Zam alparolis al la aro. Era mencias en LI XVI-a Jaro, 1911, p. 342: D-ro Zamenhof estis kore akceptita de la Urbeŝtraro, kies estro, S-ro Jan de Vos, fin salutis...

405-1/10. povoscias. Ĉi tiu vorto estas alia distingilo de Zam-stilo. Li preskaŭ neniam uzis la formon scipovi, kiel on vidas el la malsupra listo:

	povoscii	scipovi
Batalo	—	—
Fabeloj I	29	—
Fabeloj II	46	—
F. Krestomatio	—	—
G. Dandĉin	—	—
Gimnazio	—	—
Hamleto	—	—
Ifigenio	—	—
L. Respondoj	—	—
Marta	23	—
Orig. Verkaro	1	—
Proverbaro	—	—
Rabeno	3	1
Rabistoj	—	—
Revizoro	—	—
	102	1

Pri la Biblio ni ne faris rekordon, sed ni

estas certaj ke ni ne vidis scipovi. Unu sola „povoscii“ en la tuta OV estas ĉi tie p. 405-9/10. Rimarku ke ĉi tiu vorto aperas abunde en la Fabeloj.

### 406. Oka Kongreso 1912 en Kraków.

OV ref: LI, Katryn, R, Ed.  
Niaj ref: LI, Katryn, R, ED, Ĉas, Möb, Brüg, OG.  
(Raporto de Ned Katryn estas eltiraĵo el LI kaj de la samaj prestipoj. OG estas tute identa kun ED.)

406-30. Bedaŭrinde tre malmultaj estas tiuj personoj. LI kaj OV solaj legas malmultaj, dum ĉiuj aliaj nemultaj. „Nemultaj“ estas malofte uzata, sed ne mankas en Zam. Komparu OV 404-35: per nemultaj vortoj. Ĉi tiu donas pli moderan nuancon ol malmultaj.

407-17. elmetata el senĉesaj ventoj. OV sola preserare donis „el“, kiu devas esti „al“.

409-26. Ĉion. OV, R, ED; Möb korekte donas „Ĉion“, dum LI, Ĉas, Brüg erare donas „Ĉio“.

410-4/5. kvankam ne ĉiuj en egala formo; sed la mondo devas scii, ke tiu spirita parenceco inter mi kaj vi estas tute laŭvola. Ĉi tiu legado estas laŭ OV kaj LI. Ĉiuj aliaj donas la vorton tute antaŭ en egala formo: kvankam ne ĉiuj tute en egala formo... estas laŭvola. Ĉi tiu dua legado ŝajnas pli bona. Komparu OV 411-33: kvankam ne ĉiuj en tute egala formo kaj grado.

410-13/6. kiu havas absolute nenian devigon por ĉiu esperantisto aparta, sed kiu, kiel vi scias, plene regas kaj ĉiam devas regi en la esperantaj kongresoj. La tuta frazo de 24 vortoj mankas en R, LI kaj Ĉas, dum la aliaj ĝin havas. Ĉu la frazo estis intence aŭ senintence forigita en la unuaj referencoj aŭ ĉu ĝi estis enmetita poste en ED (OG) ni nun havas nenian rimedon por certigi.

(Fino.)

## Abelkultura terminaro.

De Karlo Gerber, Augsburg, Germanlando.

Abelinbrediloj:  
larvo-transigilo — kulretforma ilo, per kiu la larvoj el la ĉeloj de selektita abelaro estas transportataj en artefaritajn ĉelojn;

410-31. nepre venkos. Tiel legas LI kaj OV, dum ĉiuj aliaj certe venkos, kiu ŝajnas preferinda. „Nepre“ havas la nuancon de neceseco kaj decido, „certe“ de sendubeco.

410-38. Se en nia afero aperos io. OV sola legas aperos, dum ĉiuj aliaj legas en estanta tempo aperas. Komparu 404-4; tio morgaŭ aperas; 406-1: morgaŭ povas ne vivi.

411-13, 15/6, 21 (ĉi tie la tekstoj estas diversaj):

13	15/6	21
R, Möb	havis neniom pli	havis havis
ED (OG)	havis nenion pli	havas havis
Ĉas, Brüg	havis neniom pli	havas havis
LI, OV	havas nenion pli	havas havis

411-20. en tiu grava kaj solena momento. ED kaj OV ne havas necesan ĉi antaŭ tiu. Ĉiuj aliaj legas ĉi tiu.

### 412. Respondo de D-ro Zamenhof, 1913.

OV ref: Merchant : Joseph Rhodes.  
Nia ref: (sama kiel la supra).

(La suprenomita libro estas laŭ mia scio la sola fonto kaj nekontrolbla per aliaj tekstoj. En ĉi tiu tre mallonga parolado jam troviĝas du nezamenhofaj esprimoj.)

412-18. Esperanto jam ne plu dependas. Zam plej kredible diris: Esperanto jam plu ne dependas. Zamenhofa kutima esprimo en frazo, kio „jam“, „plu“ kaj „ne“ troviĝas, estas:

(Subj.) plu jam ne (verbo).

(Subj.) jam ne (verbo) plu.

(Subj.) plu ne (verbo) jam.

Vidu rimarkojn 375-32/3 kaj 400-34 (kiu poste aperos).

412-20. Esperanto daŭrigos ĝis... „Daŭrigos“ devas esti „daŭros“ aŭ „daŭriĝos“. Zam neniel farus tiaspecan (eĉ plur-) eraron!

### 412. Parolado super la Tombo de Karlo Bourlet, 1913.

OV ref: R.  
Niaj ref: R, LI.  
(LI XVIII-a Jaro, 1913 p. 426 donas ĉefan parton de la parolado, p. 413-9/40.)

412-32/3. Mi tute ne havis la tempon, por ke mi povu. R donas 3 vortojn pli inter „tempon“ kaj „por“: la tempon, por min prepari por ke mi povu... Kredeble OV senatente ellasis la vortojn.

(Finota.)

ligna pelveto — kiu estas plenigata per fandita vakso;  
ĉelmodilo — ligna bastoneto duongloboforma ĉe unu fino, per kiu en la vakson

en la ligna pelveto estas modlata ĉelsimila kaveto;  
**ĉelolato** — ligna lato kun truoj, en kiujn estas enmetataj la lignaj pelvetoj;  
**ĉelsirmilo** — dratspiralo kiu ŝirmas la abelinĉelon kontraŭ la dismordeto flanke de la abeloj;  
**ĉelkaĝo** — kaĝo, en kiun oni enmetas la lignan pelveton kun la matura abelinĉelo, por ke la abelinido eliru neatakate.

#### Kelkaj ecoj de abelaroj:

**svarmema** estas abelaro, kiu preskaŭ ĉiujare svarmas.  
**nesvarmema** estas abelaro, kiu nesvarmante anstataŭigas la abelinon;  
**mielema** estas abelaro, kiu diligente kolektas kaj hejmenportas nektaron kaj por tio dum la somero malgrandigas la kovaĵneston;

## Publika letero al la Esperantaj verkistoj.

Tre estimataj sinjoroj!

Mi estas esperantisto dekkvar jarojn. Dum tiu ĉi tempo mi multe uzis la lingvon buŝe kaj skribe, mi havas dekojn da artikoloj, presitaj en la ĉefaj gazetoj Esperantaj, ankaŭ kelkajn originalaĵojn kaj tradukaĵojn, aperintaj en libroformo aŭ en la ĵurnaloj. Sekve oni povas alkalkuli min al la esperantistoj, sufiĉe bone konantaj la lingvon (kompreneble, mi ne pretendas aparteni al la Esperanta eminentularo!). Sed, nun mi devas publike konfesi: Mi ĉesas kompreni Esperanton! Kaj tion mi ŝuldas al vi, Esperantaj verkistoj nuntempaj, ĉar vi enkondukas tute novajn vortojn por satigi vian deziregon „nuanciĝi la nuancojn“. Kaj mi, malŝelice ne konante la ĉefajn (kiom da ili?) eŭropajn lingvojn, devas prenadi la fremdlingvajn vortarojn por ekscii, ke „dura“ estas „malmola“, „lucida“ egalvaloras al „klarvida“, „trista“ al „malgaja“, „stumbli“ al „faleti“ ktp. ktp.

Dank' al via gimnastikado kaj jonglado per la lingvo, Esperanto fariĝas ĉiam pli malfacila; ĝi ĉesas esti la lingvo de la vasta popolo, al kies uzado ĝi, certe, estas destinita, kaj estiĝas la lingvo de la elektitoj, — ties lingvo, kiuj scipovas ankoraŭ kelkajn aliajn lingvojn, enhavantaj viajn „internaciajn“ vortojn.

Mi scias, ke vi paroladas pri la „lingva evoluo“, ke vi rakontos iujn fabelojn pri la poezia (?) kaj literatura (?) lingvo, pri neceso pliriĉigi (?) Esperanton, sed vi ne konvinkos min. Anstataŭ respondo mi montros al vi tiujn multajn juvelojn de la tutmonda literaturo, aperintaj en la vera Zamenhofa Esperanto. Ĉu mi devas informi vin, ke, ekzemple, la Esperanta traduko de „Hamleto“ apartenas al la plej bonaj tradukoj de tiu ĉi eterna verko? Ĉu mi devas citi aliajn verkojn kiuj, ne enhavante viajn neologismojn, tamen majstre respegulas la originalon? Ĉu mi devas rakonti al vi pri la belegaj kaj bonegaj tradukaĵoj de la poeziaj verkoj de la plej konataj poetoj (Byron, Puŝkin, Heine, Mickiewicz, Goethe kaj multaj aliaj), kiuj sen viaj „tristaj, stumbliantaj“ formoj kaj „poeziaj liberecoj“ ne nur povis redoni ĉiujn nuancojn, ĉiujn esprimojn de la poezia ekstazo de l' poeto, sed ofte eĉ superi ilin? Ĉu mi scigu vin pri la multaj originalaj poeziaĵoj, kies aŭtoroj ne

virabelema estas abelaro, kies abelinido aŭ maljuna abelino naskadas sole aŭ precipe virabelojn;  
**virabelaĉema** estas abelaro, kies abelinaĉoj naskadas virabelajn ovojn.

#### Malsanoj: (Kovaj-malsanoj)

**kovaj-ŝimo** kaŭzata de ŝimofungo (Aspergillus flavus);  
**kovaj-pesto** kaŭzata de bacilo (Bacillus larvae White);  
**kovaj-putro** kaŭzata de bacilo (Bacillus pluiton White k. a.).  
**(Abelmalsanoj)**  
**intest-** aŭ **Nosema-epidemio** kaŭzata de protooco (Nosema apis Zander);  
**akar-epidemio** kaŭzata de akaro (Acarapis Woodi);  
**disenterio.**

bezonis „kio“ por esprimi siajn travivaĵojn plej subtilajn, por malfermi sian animon.

Por vi, Esperanto estas nur ludilo, per kiu oni povas tute libere eksperimenti. Ne gravas, se rompiĝos ĝia risorto kaj multaj esperantistoj forlasos la Esperantajn vicojn pro via „ludado“. Por vi grave estas enkonduki novajn vortformojn aŭ gramatikajn regulojn por plipresimigi Esperanton al la favorataj naciaj lingvoj kaj eble, kontentigi viajn eltrovemajn ambiciojn.

Por ni, modestaj uzantoj de la lingvo, por ni ĉiutage praktikuloj Esperanto devas resti sensanga! Ni ne povas kelkfoje relernadi Esperanton. Ni ne volas, ke Esperanto ĉesu esti lingvo facile elernebla de ĉiu.

Kaj se vi daŭrigos vian planan portortan „evoluzion“ de la lingvo, kiam povas ekribeli la popolo. Kaj ĝin ne haltigos la „kronitaj aŭ laŭrumitaj“ personoj, ĉar ĉiu ago ekvokas kontraŭagon. Jam nun estas konata al mi la faktoj, kiam kursgvidantoj ne rekomendis al siaj kursanoj aĉeti kaj legi verkojn de nuntempa, tre fama Esperanta poeto pro liaj konformaj tendencoj. Ĝi estu signo al la batalo de la tuta konscia esperantistaro por la Zamenhofa fundamenta Esperanto, ĉar la lingvo internacia Esperanto devas servi ne por instruitaj izolitaj, sed por la tuta mondo.

I. Dratwer.

## Pri la prepozicio „de“.

(Rid. al Lingva Kritiko n-ro 4, p. 3.)

Tiu temo havas kontakton kun la demando: „Ĉu akuzativo povas dependi de substantivo?“ En la Fundamenta Krestomatio ni trovas (p. 198 sube) la esprimon: **per enversado akvon**. Samlandano de s-ro Rollet de l' Isle deklaris kripla tian esprimon. Eĉ la eminenta gramatikisto Prof. Aymonier en sia franclingva libro „Grammaire complète“ konsilis, prefere eviti tiun konstruon (vol. II, p. 116).

En la jaro 1908, kiam Ido komencis ataki la akuzativon de Esperanto, mi pripensis la demandon, ĉu ni povus permesi (ne: rekomendi) „helpan prepozicion“ ekzemple „on“. Por „mi batas knabon“ estus permesate „mi batas on knabo“. Tio helpus en la supre nomita afero. Ekzemple en la

historio pri la sklaveco oni bezonas la esprimojn:

1. vendado de homoj (vendantoj),
2. vendado al homoj (aĉetantoj),
3. vendado homojn (aĉetatojn),

kaj por 3. estus permesate: vendado on homoj. La akuzativa finaĵo nur estus uzata vortforme.

Sed post detala pripensado mi opinias, ke tiu solvo estas nek bona, nek necesa. La (transitiva) ago interpretas ordinaro du aĵojn: la influanton kaj la influaton. Mi ambaŭ estas tuŝataj de la ago, dum la intermeta prepozicio de prepozicio imagigas spacan ponton inter du ideoj. — Se la influato estus katenata al la ago per prepozicio, oni rajtus fari la samon pri la influanto t. e. meti prepozicion antaŭ la subjekton. Male: en la Esperanto-teorio estas valore, diri: normala akuzativa komplemento havas al la verbo rilaton, kiu ne estas perfekte esprimibla per prepozicio.

El tio sekvas, ke ni devas permesi, ke akuzativo dependas de substantivo. Sed la „alia partio“ rajtas postuli, ke la verba signifo de l' reganta substantivo estu esprimata per „ad“ (anstataŭ „i“). Do ne diru „vendo homojn“ sed „vendado homojn“.

Tamen tiu konstruo ne tute kontentigas, se jam la reganta vorto estas akuzativo: oni malpermesis vendadon homon. Tiu kombino de du akuzativoj estas evitebla per:

1. reiro al la verbo: oni malpermesis, vendi homon,
2. transiro al la pasivo: la vendado homon estis malpermesata.
3. transiro al kunmetita vorto: oni malpermesis hom-vendadon.
4. kelkfoje per prepozicio antaŭ la reganta vorto: oni faris malpermeson pri la vendado homon.
5. kelkfoje per adverbo el la regata vorto: vizitado kongresen (nur permesata, ne rekomendata konstruo).

\*

En la nuntempa praktika uzo la Esperanto-prepozicio „de“ signifas la apartenon de unu ideo al la alia (kun-apartenon, germane Zusammengehörigkeit). Tiu aparteno estas rigardata kiel reciproka, ekz. en la esprimo „ĝardeno de domo“ (domĝardeno) la ĝardeno apartenas al la domo kaj la domo apartenas al la ĝardeno.

La „prepozicio“ de l' kun-aparteno estas „de“ kaj „kun“. Se la penso eliras de l' malpli signifa ideo, oni uzas „de“, ekz. la fruktoj de la arbo. Se la penso eliras de l' pli signifa ideo, oni uzas „kun“, ekz. la arbo kun la fruktoj. En ambaŭ kazoj oni imagas la saman arbon, la samajn fruktojn kaj la saman reciprokajn apartenon.

Kelkfoje la kun-aparteno akceptas la ideon de punkto (en spaco aŭ tempo). Tiuokaze oni donas al ĝi la signifon de komencpunkto, figure de kaŭzanto. Kaŭzanto estas ankaŭ la aganto.

Ci ĉio ne estas nova, sed troviĝas en miaj germanlingvaj libroj „Esperanto-Führer“ kaj „Einführung in die deutsche Sprachlehre“ (haveblaj ĉe Heroldo).

\*

Laŭ tiu koncepto ni nun rigardu la fin-esprimojn en la artikolo de s-ro Rollet de l' Isle.

#### Parto I:

1. Foriri de iu loko: komenopunkto en la spaco,  
De mateno ĝis vespere: komenopunkto en la tempo.

2. Tremi de febro: kaŭzanto, Rompiĝi de vento: kaŭzanto. Kanto de birdoj: kaŭzanto (de la aer-vibro „sono“).
3. De kiu estas tiu libro? Pli trafa esprimo: kies libro tiu estas? De = kun-aparteno, kies = posedo (de la posedo de).

#### Parto II:

4. Peco de tiu tuko: kun-aparteno, aŭ nuna (la tuta tuko ankoraŭ ekzistas) aŭ pli frua (= deveno).
5. Mortigo de homo, akcepto de kongresanoj, prezentado de Hamleto. Pli trafa esprimo: mortigado homon, akceptado kongresanojn, prezentado Hamleton.
6. Ĉevalo de blanka koloro. Pli trafa esprimo: ĉevalo kun blanka koloro, ĉar la penso ekiras de la pli signifa ideo.
7. Brutoj de sama speco: aŭ kun-aparteno (tiukaze „de“) aŭ simileco (tiukaze „laŭ sama speco“).
8. Vendisto de vino: aŭ kun-aparteno (tiukaze „de“) aŭ celo (tiukaze „por vino“ = por vendi vinon, por vendado vinon).

En la teksto de mia artikolo mi evitis provizore „ado -on“ antaŭ la praktika pruvo en la fin-ekzemploj. Se „de“ ne kaŭzas eraron, la prepozicio „de“ restas permesata anstataŭ „ado -on“. Eraro estus ebla en „mortigado de homoj, akceptado de kongresanoj“. Tial s-ro Roldet de l' Isle prave vokis en la mondon: estu singardemaj, uzante la prepozicion „de“, kaj uzu ankaŭ la esprimon „ado -on“.

G. Schattat.

## Aoristo.

Mi multe pripensis la artikolon pri aoristo de Prof. Waringh'en (Lingva Kritiko n-ro 9/10). Tamen estas mia konvinko, ke ne estas necese erkonduki aoriston en Esperanto, t.e. doni al ĝi apartan formon. Mi eĉ timas, ke estus granda malutilo fari tion.

Mi ne estas faktuŭo rilate al lingvaj demandoj, mi eĉ ne studis lingvajn aferojn en la strikta senco de la vorto „studi“. Tial mi devas peti Prof. Waringh'en kaj aliajn fakulojn pri indulgo kaj bonvola korekto, se mi ne bone komprenas la aferon kaj tial faras erarojn. Ke mi respondas al la artikolo, ne dependas de kontraŭdiremo aŭ de tio, ke mi kredas kompreni la aferon pli bone ol aliaj nur de tio, ke mi opinias tiun demandon tre grava, tiom grava, ke ni nepre devas krei al ni klaran koncepton pri la afero.

Komprenoble Prof. Waringh'en tute pravas en tio, kion li diras pri la agmanieroj de la verboj, sekve ankaŭ en tio, kion li diras pri la kvalito de aoristo. La demando do ne estas, ĉu tiu speciala nuanco ekzistas aŭ ne, sed ĉu estas necese akcenti ĝin per speciala tempo. Ekz.: ĉu estas necese diri: „Mia ŝosilo estis perdita de vi“, anstataŭ „Mia ŝosilo estis perdita de vi“.

Cu la daŭreco aŭ momenteco de la verboj tiom gravas, ke ni nepre devas akcenti ilin per speciala formo? Mi opinias ke ne. En la rusa lingvo estas ja vera praarbaro da perfektivaj kaj neperfektivaj verboformoj, kiuj prezentas grandegan malfacilaĵon al lernanto de tiu lingvo. Mi supozas, ke ruso havas la senton, ke tiuj diversaj formoj estas nepre necesaj, por ke oni povu esprimi tion, kion oni volas diri. Tamen, kiam oni tradukas rusan tekston ekz. en la svedan

aŭ germanan, oni tute ne havas analogajn formojn por redoni tiujn nuancojn. Malgraŭ tio la traduko estas absolute same komprenbla kaj klareca kiel la originalo. Ordinare ni tute ne sentas bezonon de atentigo pri la daŭreco aŭ momenteco de ago, kaj se oni ekzakte sentas, oni povas tre facile atingi la celon per aldono de iu kompletiga vorto.

La senco de daŭreco aŭ momenteco estas ja en la verboj mem. Tial ŝajnas al mi, ke ne estas necese atentigi pri tio aŭ pro logikaj kaŭzoj esprimi tion per iu speciala formo. Ĉu homo povas sen instruo kompreni, ke estas diferenco de daŭreco en la esprimo „La letero estis skribata“ kaj „La ŝosilo estis perdita“. Tio estas ja memkomprenebla. Sed ĉu iu malpli bone komprenas la senco de la lasta frazo pro tio, ke ni per speciala formo atentigas, ke „perdata“ estas momenteca? Mi ne povas imagi tion.

Oni ja povas diri, ke la logiko tamen postulas specialan formon. Bone. Tamen la historio de Esperanto montras multfoje kaj multmaniere, ke ne estas ĉiam plej saĝe decidi la lingvajn problemojn laŭ pura logiko. Laŭ mia opinio la principo de sufiĉeco validas ankaŭ rilate al tiu ĉi afero.

Mi samopinias kun Jung pri la simpleco de la Esperantaj verboformoj. En Esperanto ekzistas efektive nur tri tempoj, same kiel en la realeco. Se estas necese iel gradigi kaj precizigi tiujn tempojn, ni povas fari tion per „esti“ kune kun kompletiga adjektiveca verboformo, kiu tute klare montras sian propran tempan rilaton. Tion lernantoj facile komprenas. Kaj, kiel dirite, ĉu verbo estas daŭreca aŭ momenteca, tion ili komprenas sen instruo. Sed se ni devus komprenigi al ili, ke ili devas uzi specialan formon, kiam temas pri momenteca ago, tiam ni certe havus malfacilaĵon kaj tamen grandparte senfruktan laboron. Ne pro tio, ke tiu afero estas tiom malfacile komprenbla, sed pro tio, ke la homoj ordinare tre nevolonte donas sufiĉan atenton al io, kio ne havas la simplecon de neceso. Eĉ nun ekzistas multaj pekoj kontraŭ korekta stilo. Sed imagu, kiam da eraroj aperus, se ni dekretus leĝo la uzon de speciala tempo por aoristo!

Mi estas sufiĉe nova esperantisto, kaj tial mi ne scias, ĉu mi pravas; sed fakto estas, ke mi el iom pli malnovaj Esperanto-libroj ricevis la impreson, ke longtempe regis iomaj hezito kaj konfuzo rilate la uzon de la particioj. Verŝajne ne ĉe ĉiuj esperantistoj, sed ĝenerale. Rigardu nur en la vortaron de Kabe, kaj eĉ tie vi ofte trovos verboformojn, kiuj laŭ la nuna koncepto estas tute eraraj! Sed fine mi — verŝajne pro tio, ke Esperanto fariĝis pli kaj pli viva lingvo al ĝiaj uzantoj — vidas la aferon pli klare, kaj la verbsistemo ne donas al ni grandajn malfacilaĵojn. Ĉu tiam ne estus iom malsaĝe ree impliki la aferon, eĉ se estus por atingi pli grandan precizecon?

Ni ne devas kaj verŝajne ne povus reteni la evoluon de Esperanto. Sed aliflanke ni devas laŭeble provi konservi tiujn ecojn de ĝi, kiuj estas plej gravaj al ĝi en ĝia kvalito de internacia lingvo: facilecon kaj simplecon.

Stellan Engholm.

Ĉiuj redakciaj materialoj sendu al s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo; sed la materialoj por „Konsilanta Gramatiko“, redaktata de s-ro Jung, estas sendota al lia adreso en Köln.

## Kompletiga rimarko pri la objektiva genitivo.

En n-ro 5 de Lingva Kritiko s-ro Jung konsilas uzi anstataŭ „de“ la prepozicion „per“ por eviti miskomprenon en la esprimo: „malfermo al la kunsido de la prezidanto“ kaj en similaj esprimoj. Nia altestimata redaktoro ŝajnas forgesi, ke ĉia uzo de la prepozicio „per“ por montri la aganton estas kontraŭfundamenta malpermesata naciismo. La nacilingvaj tradukoj de la vorto „per“ en la U.V. montras la ĝustajn limojn de ĝia signifo. Pĉe, ĉiuj naj diversaj gramatikoj kaj vortaroj senescepte unuvoĉe instruas al ni tiun ĉi saman precizan signifon. S-ro Jung citis jam Prof-ron Göhl; mi citas nur du aliajn. Velten diras: „Por ĝi al pasivo la komplementon oni uzu la prepozicion „per“ nur kiam oni volas montri la ilon aŭ la rimedon.“ Same Fein: „La vorto „per“ esprimas instrumenton, rimedon, manieron, membron, organon, personon, kiun oni uzas por fari ion: vidi per okuloj, sendi per servisto.“ (La servisto estas la rimedo uzata de la aganto por sendi.)

Fine, sed ne malpli grave, mi rememorigas, ke Zamenhof ne nur neniam uzis la prepozicion „per“ alsignife, sed ankaŭ li opiniis alian uzadon tiel danĝera, ke li ĵugis necesa tute precize kaj regulige fiksi la diferencan inter „de“ kaj „per“, dedikante al tiu ĉi demando jenan specialan Lingvan Respondon: „La prepozicion „per“ post pasivo ni povas uzi nur en tia okazo, se ĝi troviĝas antaŭ vorto, kiu esprimas ne la aganton mem, sed rimedon uzitan de iu alia aganto, ktp.“ Ni estu singardaj kontraŭ la naciismo, ĉar ili povas naski haoson. „Gustoj naciaj“, diras nia Majstro, „devas en afero internacia tiel same absolute silenti, kiel la gustoj personaj, se ni ne volas peregi nian aferon.“

Oni do devas serĉi alian rimedon por elturniĝi el la malfacilaĵo. Tiu rimedo cetere estas facile trovebla: ni simple uzu anstataŭ la simpla „de“, ĉu „de per“, kiu estas proponata, ĉu prefere „fare de“, kiu estas jam ofte uzata.

Prof. E. Grosjean-Maupin.

## Lingvaj rimarkoj.

De John E. Bauman.

### Pri ĝeneralaj principoj.

Bedaŭrinda tendenco sin trovas en la plimulto de lingvaj diskutoj. Kutime oni diras, ke tia aŭ tia formo estas preferinda, nek konsiderante nek menciante la nepridubeblan faktan, ke tre ofte la unua formo taŭgas por ideoj aŭ cirkonstancoj, por kiuj la dua ne tiel bone taŭgas kaj inverse. En Esperanto precipe inter ĉiuj lingvoj la fakto, ke la celo de lingvo estas transporti al la leganto senŝange la ideon de la uzanto, ĉiam devas havi unuan rangon.

Ekz. en F.K., p. 141, l. 11, sin trovas: „mi vidis lin tremantan de teruro“ kaj sur p. 140, l. 6 de malspure, simila esprimo. Nu do, ne malmultaj esperantistoj tion malfandus, ĉar ili diras, ke la particio devis esti en la nominativa kazo, ĉar ĝi funkcias kiel predikata adjektivo. Sed tio estas afero, kiu ĉi tie dependas sole de la ideo en la menso de la skribanto. Se li volus predikati, ke la viro nomita vidis la duan viron esti tremanta de teruro, li uzus la no-



minativon, sed volante uzi la particon kiel adjektivon difinantan la staton de la viro, kiam li vidis lin, tute prave li uzis la akuzativon.

Simile oni ne povas prave diri senkonduke, ke estas preferinde per si mem, diri: „la vojo estas borderita de salikoj“ aŭ: „la vojo estas borderata de salikoj“. „Borderata“ metas la emfazon sur la nunan fakton, ke la salikoj formas, egale multe kiel antaŭe, borderon por la vojo. „Borderita“ metas la emfazon sur la estintecon de la unua kreado de tiu bordero. Plue eĉ esprimmaniero efektive jom malpreferinda teorie, en la praktiko foje konsistigas tre bonvenan evitilon de unutonco de stilo.

Kiam ne sin trovas demando de absoluta gramatikajo aŭ fundamenta sintakso, estas multutile al la libera uzo de la lingvo, antaŭenmeti preferojn por tia aŭ tia esprimmaniero, provante konformigi la penson al unu rigida formo. La penso devus krei la formon — tiam la leganto povas ekzakte kaj tuj kompreni el la observata elekto de la formo tion, kio estis en la menso de la skribinto.

#### Duono da (de) horo.

Bonega ekzemplo de „fendado de haroj“ estas la rimarko de William Bailey en Lingva Kritiko n-ro 2, ke ni devus diri „duono de horo“ anstataŭ „duono da horo“. Post ĉio, vorto esprimanta certan proporcion de io efektive povas esti rigardata tre prave kiel difinanta certan kvanton de ĝi. Laŭ nia ĉemomenta nuanco de la penso ni povas tute prave uzi laivole ĉiam el la du esprimoj. Ĉu la unuajtoj inter la esperantistoj ne faris saĝe en tio, kion saĝe bedaŭras s-ro Bailey, nome, ke ili ne malŝparis tempon por decidigi per reguloj tion, kio estas afero por ĉies nuanco de penso?

#### Kelkaj aŭ kelke da.

Ci tie, tuzante la preferindecon de „kelkaj“ aŭ „kelke da“, kiu estis preparolata sub la rubriko Lingvaj Notoj en n-ro 2 de Lingva Kritiko, estas menciende ke la unua esprimo estas pli elasta ol la dua. Estus ne bone diri: „kelke da homoj sentas sin plej felikaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj“. Sed tute ne estas malbone diri: „kelkaj homoj estis en la ĉambro, kiam mi eniris ĝin.“ Alivorte „kelkaj“ kaj „multaj“ certe ne neceso montras diversecon de la preparolataj objektoj, sed ili nur povas laŭ la libera volo de la skribanto montri tion, dum „multe da“ kaj „kelke da“ ne tre bone povus montri diversecon. Malpermesi aŭ eĉ nur mallaŭdi alternativan por variece uzon de „kelkaj“ kaj „kelke da“ tie, kie la ideo de diverseco ne estas grava, estus ne nur senbezona katenado de la lingvo, sed ankaŭ tute ne justigeble, kiel la sekvantaj ekzemploj de la uzo en fundamentaj verkoj montras.

En la Fundamento, Ekz. 16, kasta frazo sur paĝo 48, mi trovas „multaj“ uzata kie la demando pri diverseco de preparolataj aferoj ne sin starigas kaj „multe da“ tre bone povus esti uzata. Ankaŭ en F.K., p. 80, l. 5 de malsupre; p. 141, l. 2 de malsupre; p. 145, l. 18—19; p. 151, l. 19 kaj 31; p. 154, l. 3; p. 165, l. 8; p. 197, l. 13 p. 244, l. 8; — kaj eĉ por sinsekvaj tempoj ktp. p. 82, l. 7 de malsupre; p. 69, l. 10; p. 136, l. 13; p. 137, l. 2 de malsupre; p. 218, l. 20.

Tre klare Zamenhof ne volis postuli, ke ni devas uzi „multo da“, „multe da“, „kelke da“, ktp. anstataŭ „kelkaj“, „multaj“, kiam ni volas uzi la lastajn por variece, kaj la demando pri diverseco ne estas por ni gra-

va. Ni ne senbezone katenu nin. Konservu la liberecon!

#### Signo de „ig“.

(Vidu la respondon al demando 2, en Lingva Kritiko n-ro 2.)

La respondo pri la demando rilate „movi“ kaj „movigi“ maŝinon rememorigas pri certa principo, kaj elvolkas deziron eltrovi kiel ĝenerale ĉi tiu principo estas akceptita de la esperantistaro. Nome, ke „movigi“, ekzemple, konstruajon, signifas ke la moviganto faras tion ne mem, sed pere de muskoloj de aliaj aŭ pere de maŝinoj. Ke kiam ni trovas „ig“ intence kaj prave uzata ĉe jam transitiva verbo, tio signifas peran agon.

#### Instruado de vortoj.

Kelkaj punktoj pri la instruado de vortoj en Esperanto devus esti pli zorge priatentataj de la instruistoj. Unue, listoj de ĉiuj ĉefaj internaciaj vortoj, kiuj en la nacia lingvo de la lernanto grave diferencas de la nuanco en aliaj lingvoj, devus esti preparataj. Unu post la alia ĉiu vorto tia devus esti speciale klarigata, por eviti postan malpravan uzon. Ekzemple, la angla lernanto, kiam li renkontas la vorton „pretendi“, havas en sia cerbo la ideon de „trompi“ kaj sen klarigo ne povas eĉ supozi, ke la Esperanta vorto „pretendanto“ ne hipotezas ion pri la vereco aŭ nevereco de la pretendado, aŭ ke plue oni povas pretendi eĉ objekton.

## LINGVA TRIBUNO

#### Novaj afiksoj.

(Rilatas al Lingva Kritiko n-ro 4, p. 4.)

Mi ne proponis, enkonduki la kvar afiks-ojn (red, onc, ev, if), sed ekzameni, ĉu eble unu aŭ alia el ili estas rekomendinda. Tio signifas, ke samideanoj en ĉiuj landoj praktike provu, kombini tiujn afiks-ojn kun multaj radikoj kaj poste skribu siajn motivojn por kaj kontraŭ la enkonduko. Mi mem kontribuas:

1. La fakto, ke germanlingvo oni uzas la specialajn vortojn „fähig“ (kapabla) kaj „pflichtig“ (deva) ne malhelpas la afiksigon. Zamenhof sciis bone, ke la afero estas sama pri „wert, würdig“ (inda), tamen li afiksigis tiun signifon.

2. Afiksoj ne malfaciligas lingvon, sed male faciligas ĝin, tial ja Zamenhof enkondukis ĝin. Anstataŭ unu afikso devus esti lernataj ja multaj radikoj. Se por „pagkapabla“ (longa; prononca kolizio de g kaj k!) ni povus diri „pagonca“, ni ne bezonus la postfundamentan oficialigon de „solventa“. Tiu unu vorto jam postulas tiom da lernlaboro, kiom postulus la tuta „onc“.

3. Sufiksoj krome malpezigas la stilon. Lia komenc-vokalo ebligas kunfandadon kun ĉiu konsonant-kombino; ekz. pentr-inda en la prononco fariĝas pen-trinda. Lia mal-longeco estas precipe ŝatinda, se sekvas aliaj vortpartoj, ekz. en „regidino“ anstataŭ reg-devenint-ino. La „sciencaj afiksoj“ de Ido estis mallaŭgaj pro tio, ke la signifodiferencojn ne konis la nescienculo; sed la signifojn „kapabl“ aŭ „dev“ konas ĉiu homo.

4. La uzo de afiksoj en Esperanto ne estas deviga. Malgraŭ „bonulo“ oni rajtas diri „bona viro“; malgraŭ „skribenda verko“ (cetere neoficiala afikso) ĉiu rajtus diri ankaŭ „porskriba verko“. (? — Red.)

5. Ankaŭ post akcepto de „onc“ neniu

devus diri „servonc-atesto“, (Dienstfähigkeits-Zeugnis), sed plue rajtus diri longforme „servkapableca atesto“. La lernado de „ev“ por „dev“ postulus unu minuto; post tiu minuto vi povus diri „morteve“, sed tamen ankaŭ laŭ nuna maniero „mortadodeva“. La vorto „mortodeva“ estas plursenca (devo de morto).

Tamen la redakcio prave avertas kontraŭ facilanima enkonduko de novaj afiksoj. Nur se post detala kaj sufiĉe longa kolektado de kontraŭ-motivoj kaj por-motivoj la lastaj pruviĝas evidente pli gravaj, oni decidu jese. Prefere unu jaron pli poste enkondukata, ol poste bedaŭrata. (Rig. intence: intense.) G. Schattat.

#### Mortema.

La angla frazo: „All men are mortal“, estas ĝenerale tradukita per: „Ĉiuj homoj (La homoj) estas mortemaj“. Diras Kabe'a Vortaro ĉe „mortema“: kiu devas morti pli aŭ malpli baldaŭ, kiu ne posedas la senmortecon; mortulo = mortema homo. La Plena Vortaro: Pli malpli frue mortonta pro sia propra naturo; kaj ĝi citas la Zamenhofan: „Nia korpo estas mortema“. Ce I Kor. 15/53 ni legas: „Estas necese ke... ĉi tiu mortema surmetu senmortecon“. La nacilingva—Esperanto-vortaroj preskaŭ ĉiuj enhavas la formon „mortema“; kelkaj aldonas sinonimojn derivitajn de la radiko „mort“, kiujn mi poste kritikos.

Malgraŭ la supraj aŭtoritataj citoj iuj verkistoj provas trovi pli bonan formon. Por ili „mortema“ enhavas neĝustan ideon de „emo al morto“, do „malsanemo“. Ĉu ne vere, ke ĉesence en la homoj ankaŭ la vivo emas daŭri ĉiam plu?

Fulcher and Long donas ankaŭ „mortula“. Nu, laŭ Millidge „morta“ signifas „of death mortal, fatal“; Sidlovskaĵa en „La Kapitanfilino“, p. 77, skribis: „la morta kozako“ (= la mortinta kozako). Tial ni devas rigardi „mortulo“ kiel ulon karakterizatan per la mortinteco, kaj ne kiel „mortemulon“ (A.: a mortal being). Pfeiffer donas sub „sterblich“ ankaŭ „morteca“. Ankorau nekontentiga, eĉ erariga, ĉar „morteca“ estas nur „morta“ plus la abstraktiganta „-ec“.

Haefker en sia „Jarmiloj Pasas“, p. 107, 212, 230, uzas „mortdeva“, „mortebli“ („nemortebulo“, t.e.: an immortal). Sed tiuj formoj estas neperfektaj por traduki la anglan „mortal“ pro tio, ke mortdeva ankaŭ estas murdinto sur la pendigilo, kaj „mortebli“ saĝnas ne sufiĉe forta; ĝi rajtas aplikigi nur al objektoj, kiuj „povas morti, sed ne estas sub la devigata marto“.

Kelkaj eble diros: Kial fendi harojn? Al tio mi respondas, ke mankas ĝis nun en Esperanto scienco ĝusta vorto por vesti la nocion „mortal“. La radiko „mortal“ troviĝas en la latinidaj lingvoj: tiuj Esperantaj verkistoj jam uzis ĝin. Konsiderinte, ke naĝas en nia lingvo jam kelke da senutile duoblaj formoj: brut(al)a, soci(al)a, naci(onal)a kaj aliaj, ĉu ne pardoninde prov-enigi „mortal“ en nian lingvon sence de la bonegaj difinoj de Kabe kaj la Plena Vortaro ĉe la mia opinie nebona „mortema“, malforta surrogato de nia frutempa lingvo-evoluo?

Robo, Melbourne.

#### Eldonejoj

de novaj Esperanto-gramatikoj, vortaroj kaj similaj libroj prilingvaj, dezirantaj specialan kritikon pri tiuj libroj en „Lingva Kritiko“, estas petataj sendi po unu ekzemplero al la ĉefredaktoro s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo.